

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 3/1985 ★ Kr 8,50



La prezidanto
de la sveda parlamento
Ingemund Bengtsson
inaŭguros la SEF-kongreson
en Helsingborg.

Multaj esperantoaranĝoj
atendas vin somere,
inter alie la UEA-kongreso
en Augsburg



© IOMCO

Urbodomo

70a Universala
Kongreso de
Esperanto

Augsburg 3.-10.8.1985
2000 jara urbo

El la enhavo:

- Vojaĝo al Mariehamn
- prezentado de koresponda kurso
- novaj Libroĵ sur niaj bretoj

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet
måndag-torsdag kl. 17-19.
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-
förbundet.

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 75 kr
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvintopinto. Om du inte får den, med-
dela födelseår till Esperanto Centro.

SEF:s styrelse

Ordförande: Roland Lindblom
tel. 08-777 41 75,

Sekreterare: Anita Lindblom
tel. 08-773 40 24,

Kassör: Karin Lindquist
tel. 0589-155 31,

Märtha Andreasson, Niklas
Gustafsson, Kerstin Rohdin,
Birger Vigger.

Suppleanter:

Ingemar Nordin, Åke Rohdin.

La Espero

Organ för Svenska
Esperantoförbundet.

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.
Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.

Redaktion:

Karin Lindquist (huvudansvarig)
Västermovägen 19, 732 00 Arboga
tel. 0589 - 155 31

Ulf Ribers, Norra Freberga,
591 90 Motala, tel. 0141-220 35.

Bertil Danielsson (layout)

Årjäng, tel. 0573-105 69.

Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1985

Manuskript sändes en månad före
utgivningsdatum till
Karin Lindquist (adress se ovan).

Esperantoförlaget

Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept. - 15 maj:

onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras
hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

HODIAŬ

De la estraro kaj redakcio

Esperantofrämjandet

Ĉu vi varbas "esperantofrämjare"
- laborkameradojn, amikojn,
parentcojn... personojn, kiuj an-
koru ne estas preta pagi la ple-
nan jarkotizon? Vi povas legi pri
la ideo varbi apogantajn mem-
brojn en la Espero numero unu
kaj du. Faru vian plejblon! Espe-
ranto Centro elsendis al ĉiuj klu-
boj "varbilojn" kun enpagiloj.
Havigu ĉe via klubo aŭ rekte ĉe
EC. Varbi "esperantofrämjare"
povas esti unu el viaj kontribuoj
al la jubilea jaro. Memoru ke nia
prezidanto promesis varbi mini-
mue 20 dum 1985!

Pri la jubilea jaro

Dum la jarkongreso en Helsing-
borg estas rezervita tempo por dis-
kuti la agadon antaŭ LA JARO.
Tiam prezentos la estraro sian la-
borplanon, kiu kompreneble kon-
cernas la klubojn kaj la indivi-
duajn membrojn ankaŭ. Estas ja
grave ke ni nun ĉiuj streĉos nian
forton por Esperanto. La memo-
bronombro ne altiĝis dum la ĵus

pasinta jaro, malgraŭ kelkaj klu-
boj vere atingis bonan reulton.
Kaj ni devas trovi rimedojn pli-
bonigi la membrosiferojn. Nun
kiam ni havas dungiton plen-
tempe, ni povas realigi la diver-
sajn ideojn viajn pli bone ol an-
taŭe. Jen, venu al Helsingborg
plenplena da ideoj kaj proponoj!

La Espero

La Espero nr 2/85 estas numero
ĉefe por kaj de gejunuloj, okaze
de La Internacia Junulara Jaro
1985. Mendu ekzemplerojn ĉe EC
kaj disdonu al interesuloj, lerne-
joj, ĉe ekspozicio, metu en biblio-
tekoj...

Anoncoj en La Espero

Anoncu volonte en la Espero. La
prezo estas laŭ jene:

1/1 sida kronor 1.200

1/2 sida kronor 725

1/4 sida kronor 425

2 spalterx6 cm kronor 250.

Karin Lindquist
estrarano kaj redaktoro

AUGSBURG

1985 års stora internationella Esperanto-världskongress kommer att
äga rum i Augsburg, södra delen av Tyskland. En intressant, histo-
risk stad med omgivning, som är lockande.

KONGRESSAVGFITER (i svenska kronor)

Kategori:

	Till	Efter
	14/5 1985	14/5 1985
1. Icke direkt medlem i UEA	509:-	594:-
2. Direkt medlem i UEA	422:-	509:-
3. Kunulo/junulo/handikapulo - ICKE direkt medlem i UEA	339:-	422:-
4. Kunulo/junulo/handikapulo - direkt medlem i UEA	255:-	339:-

Beställ anmälningsblankett från Asta Schaedel, V. Rönneholms-
vägen 42 B, 217 41 Malmö, tel. 040-91 63 09 (om Du ej redan har
sådan). Blanketten sänds - ifyllt - tillbaka till samma adress.

All betalning sker till postgirokonto 14 74 29-5 (Esperantoför-
bundet, specialkonto, Malmö). Anteckna på talongen vad betalning-
en avser.

Ĉu vi promesis?

Prezidanto:



INNEHÅLL/ENHAVO

- 28 Presentation av
en brevkurs
Partopreninda
finn-sveda renk..
- 29 Tra la lando
- 30 Glöm inte Tjörnarp
Novaj libroj sur
niaj bretaj
- 31 Den nya littera-
turen, recension
Till Augsburg med
- 31 SEF:s bussresa
- 32 Esperanto en Radio
La kongresanoj sa-
lutas la kongres-
urbon
- 33 Kien vojaĝi somere
Dankon
Sciencra revuo
SEJU
- 34 Diversaĵoj
- 35 Birdo Fenikso
Opinio
- 36 Korespondpetoj
Novaj poŝtmarkoj

NOVAJ METODOJ POR KRESKI

La plej multaj kluboj en nia lando estas iamaniere stabilaj. Mi tiam estas pri membronombroj. Alia vorto povus esti konservema, aŭ malice dirite, inerta.

La klubo de mia iama hejmurbo konservigis ĉirkaŭ 15 dediĉemaj anoj kaj mi konstatas ke multaj kluboj restades ĉe sia iam atingita membronombro. De tempo al tempo tamen okazas ĝojigaj aferoj.

Pasintjare SEF promesis premiojn al kluboj kiuj nombre kreskas, kaj mi notas kun ĝojo ke kelkaj nun meritas premiojn. La tri premiotaj estas Umeå, Hallsberg kaj Motala. Ĉefe temas pri junuloj, kaj tio montras denove ke nia lingvo enhavas valorajn ecojn kiuj estas same gravaj kaj aktualaj kiel antaŭ cent jaroj.

Meze de la ĝojo mi volas reveni al la vortoj de mia enkonduko. Ĉu la periodo de ekstra aktivado, en la ĵus menciitaj kluboj, nun transiros en longa periodo de "stabileco"?

Ne estas loko tie ĉi por profunde analizi la kaŭzojn, sed mi estas certa ke distancoj, se longaj

kiel en la Stockholma regiono, malhelpas la entuziasmon. Alia afero temas pri la ebleco partopreni aktive en la kluba laboro. En malgranda klubo preskaŭ ĉiuj membras en la estraro kaj tial la plej multaj sentas sin aktivaj kaj bone informitaj. En granda klubo kun 175 membroj ne estas pli da rektaj aktivulo ol en malgranda klubo.

Precipe en urbo kiel Stockholm devus troviĝi ia subkluba reto. Oni povus dividi Grand-Stokholmon en 25 regionetojn kaj elekti minimume unu respondeculon el la nuna membraro, por ĉiu regioneto. La respondeculo kolektas helpantojn en sia regioneto, faras reklamon kaj provas aranĝi kursojn.

La klubo en Stokholmo nun havas tute novan prezidanton, Inger Hultqvist, kaj ŝi komencis lerni Esperanton antaŭ unu jaro. Ŝi estas juna kaj kapabla vidi kaj sekvi novajn ideojn. Do, Inger, bonvenon inter la aktivuloj kaj ne timu novajn metodojn.

Roland Lindblom

Presentation av en brevkurs

Esperantoförlaget har nu låtit trycka upp en liten brevkurs. Den består av sex brev, och man menar att den ska kunna användas så här:

Brev 1 ska finnas i stor upplaga och spridas som en vanlig esperantobroschyr, alltså delas ut till intresserade, läggas ut i skolor och bibliotek etc, stoppas i händerna på folk. En person som får brevet i sin hand ska då lockas att lösa de exempel som finns i brevet och slutligen skriva den svarsuppgift som avslutar brevet. Svaret ska sen förhoppningsvis insändas till Esperanto Centro åtföljd av 2 brevporton. I retur kommer sen uppgiften rättad och med finns då också brev 2. Så ska det hela fortgå genom de sex breven. I brev 4 kommer en anmodan att skaffa Lilla ordboken och den lilla romanen "Gerda malaperis", och i sista brevet rekommenderas inköp av någon lärobok och deltagande i kurs. Alla breven innehåller någon faktaruta.

Studieuppläggningsen i kursen har provats under en femårsperiod som veckoslutskurs och som introduktionskurs före vanliga kurser med lärobok. Tolv lektioner har brukat räcka för genomgång av materialet med undantag av svarsuppgifterna. Erfarenheterna har varit uppmuntrande.

Kursen bygger på de grammatiska grundbegreppen. Förkunskaper i det området underlättar inlärandet.

Kursens ordförråd är mycket begränsat, ett par hundra ordstammar i övningsavsnitten.

Målsättningen är att kvickt lära sig språkets konstruktion: Att lära sig göra en mening innan man börjar tala.

De korrelativa orden kommer därför sent i kursen. Det påstås (bl a av W Auld) att många elever har slutat en påbörjad nybörjarkurs på grund av det för dem främmande i "tio, kiu, ĉiu" etc. Som lärare glömmer man lätt, att

Partopreninda finn-sveda renkontiĝo en Mariehamn 21-22.9.1985

Kunlaboraj Organizantoj: Esperanto-Asocio de Finnlando
Sveda Esperanto-Federacio
Esperanto-Societo en Turku/Åbo

El la programo:

Sabate 21.9.85

- 8.15 Sveda grupo vojaĝos el Stockholm
- 14.30 Alveno en Mariehamn
- 16.00 Bonveniga kafo en la hotela restoracio
- 16.30 Rondiĝo en la parlamenta domo, Mirjam Öberg, deputito, gvidos
Eero Sepponen prezentas la insulon Kökar
Svedaj kontribuajtoj
- 19.00 Festa vespermanĝo

Dimanĉe 22.9.85

- 8.00 Matenmanĝo
- 9.30 Navigacia muzeo kun la ŝipo Pommern, Arta kaj Alanda muzeoj
- 13.00 Lunĉo
- 15.20 Forveturo per ŝipo al Stockholm.

Ni loĝos kaj manĝos en la luksa hotelo Arkipelag kaj la du tagoj en Mariehamn kostos nur 415 finnajn markojn, kiujn ni devas pagi en du partoj:

- 200 FMK devas esti en Turku ĝis la fino de majo
- 215 FMK devas esti tie antaŭ la 5-a de septembro.

La adreso:

Turun Esperanto-yhdistys, Puolalanpuisto 4 a 3, 20100 Turku, 10. Telefonon 921-18771 vespere. Postĉ. konto TU 52 33 65-2.

Broŝuron pri la vojaĝo vi povas ricevi per Esperanto Centro en Stockholm.

"Amu kaj dorlotu vin mem en luksaj ejoj. Varia kaj alloga programo donos al vi neforgeseblajn memorojn", skribas niaj finnaj geamikoj.

många av tabellorden har mycket låg frekvens. Enligt den jugoslaviska undersökningen om talad esperanto upptar de adjektiviska (dvs de som slutar på -a) endast 0.3%. I Zamenhofs Originala Verkaro förekommer endast "kiu, ĉiu, tiu" i någon stor omfattning. Hälften av korrelativen (23) har hos Zamenhof frekvens lägre än 1 %, och av dem förekommer fem stycken över huvud taget inte alls. Även det genialiska systemet med affix kan lätt bli en negativ sak för en nybörjare. Text "gemaljunuoj" (som finns i kursen) låter tungt, och ĉeestantaro (som inte finns med) är svårt att analysera för en nybörjare.

Några affix är med i de första breven men de behandlas som helhet först i brev 6.

Ingemar Nordin

Nu finns i lager
den nytryckta Bibeln
LA SANKTA BIBLIO
i grönt vackert band,
pris kr 75:—.
Dessutom:
La Nova Testamento 25.-
La Viro en la mortotuko 20.-
**FÖRLAG GRÖNA
STJÄRNAN**
Landerigat. 7,
416 70 Göteborg
Tel. 031-19 37 90



Tedu regiono

På förekommen anledning vill jag först tala om att TEDU inte betyder att vi är speciellt tråkiga här (kanske tvärtom), utan det är helt enkelt en sammanställning av länsbokstäverna för fyra län, (alltså ej identiskt med Mellansverige).

23-24 februari hade vi en uppföljning av pilotkursen i september om argumentation. Deltagare från fem olika klubbar i regionen ställde upp trots att snön låg djup och halkan var svår. Klas Persson från Västerås, som deltog i pilotkursen, ledde helgens övningar. Han håller på med vuxenutbildning i sitt jobb och ledde deltagarna förbi de olika fällor och svårigheter, som finns. Deltagarna höll egna framföranden, där man använder sig av en disposition, som man går igenom på kursen. Det är intressant att se hur stor skillnad det är mellan det framträdandet man höll på lördagen och det man höll på söndagen. Det är ju i princip meningen att alla esperantister i Sverige ska ta del av denna kurs. När tillfället kommer till er, deltag, för man lär sig faktiskt mycket. Kursen bygger på professionellt material, som framtagits för kommuner och företag.

I mars väntar vi på Stanislaw Burba från Polen, som ska hålla föredrag i flera av regionens klubbar om en resa i Tatrabergen. Hans turné kommer förhoppningsvis att lämna spår i många tidningar.

I mars kommer det att äga rum en stor temavecka i Örebro med bl.a. Tony Buzan, Jan Carlzon, Ingemar Nordin (esperantist från Stockholm).

Vi har fått inbjudan att delta i den med en liten utställning och

Nordokcidenta regiono

Fronte al la cent jaroj.

Estis la temo de renkontiĝo en Värmland la 10-an de februaro. Ni kolektiĝis en la biblioteko de Karlstad por diskuto. Partoprenis nombroj de la kluboj en Karlstad kaj Årjäng kaj rektaj membroj el Hagfors kaj Filipstad. Pluraj el aliaj lokoj intencis veni, sed la vintro!!!

Preskaŭ -30, kaj la aŭtomobiloj strikis oni diris.

Kion fari por fortigi la movadon en la regiono? Kursoj, kompreneble, semajnfinaj kaj kutimaj. Ŝajnis ke ĝuste nun Filipstad havas la plej viglan agadon. Kiel la unuaj en la lando la partoprenantoj ricevis probekzemplerojn de la nova leterkurso de SEF, kaj kompreneble la biblioteko de Karlstad tuj ricevis kelkajn.

"Esperantofrämjandet" estis alia punkto en nia programo.

Pluraj rektaj membroj kiuj ne eblis veni al la renkontiĝo, skribis al SEF. Frans Ljung en Bäckefors, 87-jara, skribis inter alie:

Mi ne povas fari multe, or esperanto, mi mem. Tamen, se venus iu ĉi tien por paroli al la junuloj en la lernejo, mi volonte pagu la koston de la vojaĝo, kaj poste mi provus gvidi kurson por la interesuloj.

Bonege, ĉu ne, kaj nun iu devas vojaĝi al Bäckefors, eble iu de la klubo de Årjäng por helpi Frans.

Ingemar Nordin

provlektioner på liknande sätt som vi hade mässan "Kvinnor kan" i Göteborg. Kerstin Rohdin ska håll provlektionerna.

Kerstin Rohdin

Somera Renkontiĝo Skövde la 1-2-an de junio 1985

En la Junulargastejo (Vandrarhemmet) Vasag. 14 Programo: ekskursoj en la bela regiono - amika kunestado.

Por limigi la kostojn: La ekskursojn ni faros per niaj propraj aŭtoj kaj ni kunhelpos prepari la manĝaĵojn. La elspezojn ni dividus inter la partoprenantoj.

Tranokti en la janulargastejo kostas kr. 35:-.

Adreso por senkosta aliĝo: Gunnar Olsson, Slingvägen 12, S-541 40 Skövde, tel 0550-164 51. Bonvenon al semajnfina amika kunestado!

Rikolto de la SEF:kongreso:

Deko da novaj esperantistoj en Skövde

Klubo Esperantista en Skövde povis dum sia jarkunveno en la propra klubejo havi postrigardon de tre vigla jaro.

La pinto estis kompreneble la SEF-kongreso kun 103 partoprenantoj plus gastoj el Jugoslavio kaj Danlando. Ĉuij eroj de la aranĝo estis bone "en haveno". precipe sukcesa estis la ekonomia rezultato, kiu donis SEF multajn, milojn da bonvenaj kronoj. Por tio oni povas danki interalie la tre zorgema klubkasisto Gunnar Mattsson kaj la bona apogo de komunumaj kaj guberniaj aŭtoritatoj. La ĉeestanta vicprezidento de la komunuma komitato (komunfullmäktige) Elisabeth Granath farigis tiel ravita pri esperanto ke ŝi nun estas membro de la klubo!

Sume la klubo ekhavis dekon

.... daŭrigo sekv. p.

de novaj membroj, precipe dank al kursoj post la kongreso, gvidita de la klubprezidato Gunnar Ols-son. Li "kompreneble" estis re- elektita dum la jarkunveno. La samo okazis pri vicprezidanto Börje Andersson, la kasisto Gun- nar Mattsson, Sten Broman kaj Bertil Johansson. Novelektitaj estas Bojan Pettersson kaj Gunil- la Björkman post Ernst Pilblad kaj Erna Bergström, kiuj rezignis pri reelektado kaj estis dankitaj pri ilia bona laboro.

La klubo interŝanĝas kasetojn kun multaj kluboj en la tuta mon- do, laboro lerte gvidita de Lars Westman. Dank al Gunnar Matts- son la klubo eldonis propran kantlibron. La membro Stig Kin- nander aranĝis helpsendojn al Pollando en la nomo de KELI.

Dufoje en ĉiu monato la klubo havis kaj havas aranĝoj.

Börje Andersson

Glöm inte anmäla dig till Tjörnarps!

Den 26 april-1 maj ska vi ha en träff i Tjörnarps mitt i Skåne. Programmet kommer att omfatta be- sök i skolan, i dagis. Vet du vad barnen upplever under sin vistelse på dagis?, ett alldeles nyinvtigt ser- vicehus, Vet du hur det ser ut på ett servicehus och vad man kan göra där?, bibliotek, Vet du hur man kan använda ett modernt bibliotek? Dessutom ska vi be- söka den riksbekanta stenålders- byn i Frostavallen under ledning av den mångkunnige Arvid An- dersson och Bosjöklösters slott, där vi träffar ägaren, som tillhör en av Sveriges äldsta adelsätter. På kvällarna kommer vi att ha program av olika slag, sång, före- drag om olika ämnen, tävlingar och lekar.

Som avslutning kommer vi att ha valborgsmässobål med folk- danssuppvisning och korvgrillning. 1 maj deltagar vi i förstamajfiran-

Novaj libroj sur

Lerniloj.	Paĝoj	Kr
Esperanto-Svahila-Esperanto vortaro	130	53
Blomkvist K.M.: Esp-svensk ordlista och svenskt regi- ster till Praktika Bildvortaro de Espe- ranto	30	29
Boulton, M. Faktoj kaj fantazioj Legolibro por progresantoj	432	130
Markheden. M. Ludi kaj lerni (ludkartaro)		29
Pilger, W.F. Nomoj de plantoj en nordokcidenta Europo+indekso	72+8	55
Piron, C. Gerda malaperis (fama, lingvoinstrua romaneto)	48	15
Beletro		
Aregentina novelaro	153	23
Sferoj 2 Scienc- fikca antologio	145	72
Grabowski, A. (red.) Parnaso de popoloj, antologio	236	117
Heide, Z. Spuroj de doloroj (poezio)	103	30
Jansson, Tove Muminvalo	118	39
Auld. W. (red) Esperanta antologio, bind. Poemoj 1887-1981	887	220
Kajan/Waring- hein La robajoj	107	46
Kivi, A. Sep fratoj, bind, ilustr.	360	25
Nemere, I. Sur Kampo granita	127	59
Petöfi, J. Johano la Brava	60	46
Potts, B. Facila skeĉalbumo	112	46
Sekelj, T. (red) Elpafu la sagonbros (Busa poezio de la tuta mondo) bind.	187	108
		144

det i Lund. Träffen är annonserad i 30 utländska esperantotidningar. En grupp på 20 polacker deltagar.

DELTAG I EN INTERNA- TIONELL ESPERANTO- TRÄFF PÅ NÄRA HÅLL!!!

Kostnad för program, kost och logi endast 750:-.

Anmäl dig till Ann-Christine Krondahl, Sjörupsv. 102. Äsphult 290 10 TOLLARP.

Betala till bankgiro 414-2261.

Ĉu vi konas Transpiranton

- la plej disvastigitan mond- lingvon en la Verdurbeto? Studu ĝin kaj aliajn novaĵojn en

Grönköpings veckoblad

Nur 86:- unujare.

Skribu al GV, Box 2080, 103 12 Stokholmo, aŭ tele- fonu 08-789 30 55!

niaj bretoj

Szilagyi, F. (trd.k.red.)	Sveda novelaro (nova eldono)	235	43
Tomazzo	Materada	159	92
Valano, J.	Ĉu vi kuiras ĉine?	136	110

Fakaj libroj

La Nova			
Testamento	bind	225	29
La Sankta Biblio	bind	771+225	100
40 vidindaj lokoj			
en Ĉinio	ilustr	242	29
Pitoreska Pekino	ilustr	72	15
Blanke, D.	Esperanto und Wissenschaft	88	46
Bookchin, M.	Por ekologia socio	119	18
Boulton, M.	Ne nur leteroj de plumamikoj (literaturaj eseoj)	63	35
Eicholz, R. (red)	Akademias studoj (i.a. pri landnomoj)	137(a4)	80
Ken Keys jr	La centa simio (pri nuklea malarmado)	135	29
Markhede, M.	Svenska Fåglar (ny upplaga)		20
Muller, H.	Jaro 2000	166	46
Rockiki, R. (red)	11:a Scienca interlingvistika simpozio	160	69

Kasedoj

Songazeto 1	(parolado, kanto, teatro)	75
Songazeto 4	(parolado, kanto, teatro)	75
Piron, C. kantas	Frandu Piron	99

Se vi pagas anticipe al nia pg 2012 -3, vi ne devas pagi la ekspedkoton, 5 kr. petu nian kompletan libroliston!

Esperanto Centro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

Den nya litteraturen

Recension av ett urval av det senaste årets esperantoböcker av Ulla Luin.

En bok som belönats med pris är **Kiuj semas plorante** av ungerskan Eva Tófalvi och tjecken Oldřich Kníchal, som fick Premio Raymond Schwarz i somras för boken. Båda författarna arbetar som journalister i Budapest. De har åtagit sig ett mycket svårt ämne, och gjort en läsvärd bok med flytande språk. Huvudpersonen, "jag" i boken, är nazist, det handlar om trettioalet, och han förråder medlemmarna i den esperantogrupp han är med i, förråder till och med den flickan han tän-

ker gifta sig med. Författarna tecknar en tydlig bild av hans tankevärld och livsfilosofi, men behåller samtidigt distansen, och läsaren identifierar sig främst med de människor som blir förrådda.

I serien **Sferoj** har den tredje boken kommit ut. Den innehåller enbart originalnoveller, i motsats till den första boken som nästan enbart innehöll översättningar. Det är korta science fiction-berättelser, och det är intressant att se att gruppen som ger ut bokserien har lyckats väcka upp esperantisterna till att skriva om främmande världar eller om framtiden.

Deckarförfattare blir det allt



Till Augsburg med SEF:s bussresa!

Följ med på SEF:s bussresa i modern helturistbuss till Augsburg. Avresa den 2 augusti från Stockholm via Jönköping, Helsingborg, Köpenhamn, Rödby/Puttgarden, Lübeck, Kassel till Augsburg. Hemkomst den 12 augusti – samma väg tillbaka.

Priset kronor 2.850 inkluderar reskostnader, 11 övernattningar i hotell, 10 frukostar, 1 middag.

Resan sker i samarbete med välrenommerade Nord Syd Resor i Enköping, som tidigare arrangerat esperanto-resor.

Reseledare medföljer.

Anmäl senast den 10 juni till:

EsperantoCentro
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

Tel. 08-11 74 34

fler på esperanto. Deck Dorval är den senaste, med **Jahto verturas for...kaj veturigas la morton.**

Årets viktigaste bok är **Faktoj kaj fantazioj** av Marjorie Boulton, som här har använt sin talang för både poesi och prosa och litteraturvetenskap till att göra en högst läsvärd bok för den som läst de första grunderna i esperanto. Hon har skrivit fullt njutbara, lustiga dikter om de mest tråkiga grammatiska regler. Hon har letat upp intressanta små berättelser. Hon har samlat tokiga texter från skyltar och myndigheters anvisningar. Boken är tjock och väl värd att botanisera i.

Bland senaste årets översättningar märker man genast en bok av Antoine de Saint-Exupéry, **Nokta flugo**, och också **Sur la bordo** av Nevil Shute.

Esperanto en Radio

Kun bedaŭro mi konstatas, ke la tabelo pri Esperanto en Radio, presita en La Espero n:ro 8/1984 enhavas sufiĉe da eraraj indikoj rilate frekvencojn (ondlongojn); pro miskompreno mi ricevis malkorektajn informojn ĉefe pri Pekino. Bonvolu nun sekvi la ĝustigitan tabelon en tiu ĉi numero de nia federacia organo!

Kiel vi povas vidi la tabelo estas kompletigita tiel, ke ĝi enhavas ĉiujn sendohorojn en Esperanto por la monda programo en Esperanto de Radio Pekino. Mi ofte bone povas aŭskulti ankaŭ disaŭdigojn direktitaj por ekstereŭropaj partoj de la mondo. Provu!

Kelkaj svedaj aŭskultantoj demandas, kial mi indikas tempojn laŭ UT (Universala Tempo), kiam mi same bone povas uzi svedan (MET) tempindikon. Nu, mi respondas, ke la radiostacioj en la tuta mondo uzas laŭ UT por la internacia trafiko. Kiam vi post aŭskultado konfirme skribas al la diversaj radiostacioj, vi ĉiam ricevas horarojn laŭ UT. Tio validas ĉie en la mondo, kie la aŭskultantoj sekve bone scias, kiom da horoj ili devas adicii kaj subtrahi respektive por siaj propraj regionoj kie ajn en la mondo.

Mi celas publikigi kompletajn programtabelojn almenaŭ dufoje dum la jaro, t.e. en majo kaj novembro, de kies unuaj dimanĉoj ekvalidas ŝanĝitaj frekvencoj aŭ sendohoroj. Povas ankaŭ okazi ke ekde la unuaj dimanĉoj en marto kaj septembro estas marĝenaj ŝanĝoj; ankaŭ pri ili mi - sen kompletaj tabeloj - povas informi, kondiĉe ke mi ĝustatempe ricevas informojn de la stacioj por koincidigi la publikigon al la presaj limdatoj de La Espero.

Se vi, kara leganto/aŭskultanto, de tempo al tempo raportus ankaŭ al mi pri viaj spertoj aŭ malspertoj estus tre bone. Povas esti, ke mi havas utilajn konsilojn

La kongresanoj salutas la kongresurbon

LLK de la 70-a UK en Aŭgsburgo, planas publikan prezenton de la Esperanta Kulturo sur la urba placo. Esperantistoj el kiel eble plej multaj landoj havu la eblecon prezenti al la publiko folkloron, skeĉojn kaj kantojn en Esperanto, se eble en belaj folkloraj kostumoj. La moto estos: "La kongresanoj de la 70-a UK salutas la 2000-jaran kongresurbon kaj ties civitanojn".

Merkrede, la 7. VIII, de la 14-a ĝis la 17-a horo, kapablaj kaj kuragaĵ esperantistaj artistoj, profesiaj aŭ amatoraj, povas prezenti internacian programon. Ni demonstraciuj al la ĝenerala publiko la kulturen valoron de Esperanto!

LKK donas al la kongresanoj el

kaj povas respondi al demandoj rilate teknikajn aferojn k.s.

Plej grave! Aŭskultu kaj skribu al radiostaciojn! Nur tiel ni esperantistoj povas certigi regulan

Rolf Hornej på Utbildningsradion Språk & Kultur

har lovat att 1987 ta upp esperanto som språkmodell, alltså att i ett eller flera program ta upp hur språk är uppbyggda, och då använda esperanto som förebild.

Roy

la tuta mondo interesan ŝancon: dependas de la Esperanta mondo mem, ĉu ni sukcesos gajni la simpatiajn kaj la koron de la aŭgsburganoj.

Por povi kunordigi la tuton, necesas, ke ĉiu partoprenanto en tiu "Festivalo" priskribu sian kontribuon kaj sendu al LKK (Seltzstrasse 14, D-8900 Augsburg). La unuopaj prezentadoj daŭru kvin ĝis maksimume dek minutojn.

uzadon de nia lingvo en la internacia radiotrafiko. Amike salutas.

Lennart Åberg

ESPERANTO en RADIO

Stacio	Tempo laŭ UT +)	Frekvencoj je kHz (ondlongoj je metroj)
--------	-----------------	---

(Ĝustigo kaj kompletigo; komparu tabelon en La Espero 8/1984)

Ĉiutage:

Pekino	2000-2030 1)	9965 (30,1), 9365 (32,0), 7470 (40,1)
	2230-2300 2)	9700 (30,9), 7035 (42,6)
	1100-1130 3)	11600 (25,8), 9480 (31,6)
	1300-1330 4)	15385 (19,4), 11685 (25,6)

+) ATENTU! En la program tabelo vi trovas tempan indikon laŭ UT (Universala Tempo, =pli frua GMT-indiko). Por Svedio validas MET (Mez-Eŭropa Tempo), kial vi devas aldoni unu horon al UT; en periodo de somera tempo aldonu du horojn, escepte por Zagrebo, kiu ĉiam sekvans MET.

Notu: 1) Antenoj direktitaj al Eŭropo.

2) Antenoj direktitaj al Latin-Ameriko

3) Antenoj direktitaj al Japanio, Koreio

4) Antenoj direktitaj al Sudorienta Azio.

Kien vojaĝi somere!

Vroclava Filio de Pola Esperanto-Asocio invitas al tradiciaj esperantistaj feriadoj en Miedzygórze: **La 4-a Internacia Feriado "Esperanto Hejme"**, kiu okazos en la tagoj 1985-08-18-31.

La 21-a Internacia Esperantista Feriado "ora pola aŭtuno", kiu okazos en la tagoj 1985-09-2-15.

Aliĝojn akceptas kaj detaljn informojn sendas: Pola Esperanto-Asocio, P.O. Kesto 16 Pl 50-952 Wroclaw 17, Pollando.

La Somera-Esperantista-Familia-Tendaro okazos de la 17-a ĝis 24-a de aŭgusto 1985 en Thomsdorf en la norda GDR, ĉirkaŭ 35 km oriente de la urbo Neustrelitz. Antaŭaliĝojn akceptas kaj detaljn informojn sendas: Werner Pfenning, GDR-2000 Neubrandenburg, Leibnizstrasse 5/67.

V-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco 1985 okazos de 8-a ĝis 14-a de septembro en Schwerin, GDR La ĝenerala temo de IMEK V'85 estas: "Kun sana junularo por popola bonfarto kaj paco". Oni krome ankaŭ traktos aliajn ĝenerale interesajn medicinajn temojn kaj problemojn de medicina terminologio en Esperanto. Ĉiuj esperantistaj kuracistoj, flegistoj farmaciistoj, veterinaroj kaj anoj de parencaj profesioj estas kore invitataj travivis klerigajn kaj amuzajn tagojn en internacia kolega medio.

Petu aliĝilon, informilon pri trankonktoj kaj pluajn informojn ĉe Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, DDR-1080 Berlin, Charlottenstr. 60.



Koran dankon pro viaj malavaraj donacoj al diversaj kolektadoj:

KLUBO 100 JAROJ

Ivar Andersson, Tranås
Arvid Johansson, Huskvarna
Nils Svensson, Borås
Gustaf Nygård, Göteborg

KLUBO CENT

Ulf Ribers, Motala
Ragnar Hjorth, Stockholm
Arvid Johansson, Huskvarna
Gävle Esperantoförening
Anna Eriksson, Sundsvall
Ljungby Esperantoklubb
Arne Andersson, Falun
S. Uno, Motala
Gustaf Nygård, Göteborg
Ove Kleborgh, Hässleholm
Oskar Svantesson, Västra Frölunda

Anna-Greta Strönne, Malmö
Jan Strönne, Malmö
Ivar Andersson, Tranås

Karl Gustafssons minne:

Gunnar Larsson, Stockholm
Anna-Greta och Jan Strönne

isae

internacia scienca asocio esperantista

estas tutplaneda organizaĵo de fakuloj kaj interesigantoj de ĉiuj sciencoj. Ĝia oficiala organo

sciencia revuo

aperas kvarfoje jare kaj enhavas legindajn artikolojn sciencajn kaj popularsciencajn pri ĉiuj temoj. Laste aperis: matematika kajero (143), biografia kajero (144-145), ĥemia kajero (146) kaj sociscienca kajero (147). Petu provkzempleron!

Membriĝu! Apogu la akceptadon de esperanto en la scienca informistemo! Kotizo por 1985: 67 svedaj kronoj. Kvin kotizoj validas 6 jarojn, 8 kotizoj 10 jarojn, 15 kotizoj 20 jarojn kaj (30-n/5) kotizoj validas por via tuta vivo, se n estas via aĝo en jaroj.

Landa delegito por Svedujo:
Christer O. Kiselman, Tuvängsvägen 38, 752 45 Uppsala. Poŝta ĝirkonto 55 57 35 - 0. Telefonoj: 018-30 07 08 kaj 18 32 16.

ESPERANTO
FORSTAS!

SEJU

Aalen i Västtyskland

16-18 augusti finns det möjlighet att vara med på en ungdomsträff i Aalen. Det passar utmärkt efter den universella kongressen i Augsburg. Vill du träffa ungdomar från hela Europa eller förhoppningsvis hela världen, skicka efter mer upplysningar från: Thomas Kolb, Bismarckstrasse 78, D-7080 Aalen, Västtyskland.

TEJO-Tutmonde

Så heter Världsongdomsesperantoförbundets medlemstidning, som handlar om esperantoarbetet. TEJO:s andra tidning Kontakt, handlar ju som bekant om olika teman, som skiftar från nummer till nummer. I det senaste numret av TEJO-tutmonde kan man läsa om vad som händer i ungdomsesperantorörelsen i bl a Kina, Ungern, Jugoslavien, Japan, Rumänien, Sovjet, Sydkorea och Schweiz. Om du är under 26 år och vill ha TEJO-Tutmonde 5 ggr/år, Kontakt 6 ggr/år och UEA:s årsbok kan du bli medlem i TEJO och betala 60 kronor till Esperantoförbundet, Specialkonto (postgiro 14 74 29-4). Ange födelseår! Vill du dessutom ha Revuo Esperanto 11 ggr/år får du lägga till 120 kronor och betala sammanlagt 200 kronor.

KIU KIAM?

Interlingvistika memor-kalendaro

Lige kun la redaktaj laboroj de **Enciklopedio de Esperanto** nun pretiĝas, por eldono en 1987, interlingvistika memor-kalendaro. Ĝi enhavas du partojn:

- 1) **alfabete laŭnoman**, kun la jaro de naskiĝo kaj morto,
- 2) **kronologian** kun precizaj indikoj pri datoj de naskiĝo kaj morto kaj la respektivaj lokoj kun aldono de la hodiaŭa ŝtato.

Jen tri tipaj ekzemploj:

- 1) GRABOWSKI, Antoni (1857-1921)
- 2) * 1885-03-13 Paul BEN-NEMANN, Leipzig (DDR) 1905-08-09 Akcepto de la Deklaracio pri Esperantismo, Bo-ulogne-sur-Mer (F) + 1935-01-08 Louis de BE-AUFRONT (t.e. Louis CHEV-REUX), Thezy-Glimont (F)

La verko entenas ne nur datojn de la Esperanto-movado, sed de la plan-lingva movado ĝenerale. Por igi ĝin maksimume kompleta kaj preciza, ni petas la **helpon de ĉiuj esperantistoj** per alsendo de indikoj laŭ la supraj modeloj.

Viajn indikojn direktu al la eldonisto:

Artur E. Iltis,
Schulstr. 30,
D-6601 SCHEIDT.

Universitata disertacio pri Esperantaj libraroj

En junio 1984 Eleonora Worsztynowicz prezentis ĉe la Universitato de Poznan sian licencian disertacion s.t. "Kolektoj de Esperantaj eldonaĵoj". Tiu 180 paĝa disertacio, kiun alte aprezis Libroscienca Instituto kaj polaj esperantologoj, donas multflankan analizon laŭ historio kaj nuna stato, kaj ankaŭ eltiras konkludojn por estonto lige kun centjariĝo de Esperanto.

Kio nova en Ĉinio?

En grandega lando, kia estas Ĉinio, la Esperanto-movado bone progresas. Jen kelkaj el la faktoj detale priskribitaj en la revuo "El Popola Ĉinio"

En 1984 funkciis Esperantorondoj en 22 provincoj, en aŭtonomaj regionoj, en grandaj kaj mezgrandaj urboj tra la tuta lando. Multaj el tiuj organizaĵoj eldonas propran organon kaj aranĝas ekspoziciojn, kursojn, studsemajnojn kaj konkursojn pri tradukado kaj parolado.

Ekzistas pluraj korespondaj lernejoj kun entute 100 000 Esperanto-lernantoj, precipe junuloj.

Sub la aŭspicio de la Eduka Ministerio, Ĉina Esperanto-Ligo organizis jam 3 porinstruistajn kursojn pri la Internacia Lingvo. Diplomiĝis dum la lastaj tri jaroj 41 pedagogoj.

La ĉina Esperanto-Eldonejo kaj diverslokaj asocioj publikigis ĉ. 70 librojn en kvanto de kelkcent miloj da ekzempleroj. Tamen mankas taŭga lernolibro por studentoj.

Dank'al multaj klopodoj, diversaj sociaj rondoj pli kaj pli simpatias kaj subtenas la Esperanto-Movadon en Ĉinio. Estas antaŭvideble, ke la 71-a Universala Kongreso (1986, en Pekino) certe estigos ankoraŭ pli grandajn eĥojn. Jam nun, gazetoj, radio- kaj televid-stacioj ofte raportas pri Esperanto-aktivaĵoj.

Ĉiulandaj pacpropagandiloj serĉataj!

Samarkanda Esperanto-klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn materialojn. Sendu al:

Interklubo "Esperanto"
SU-703 000, Samarkando
Glavpoĉtamt, abon.ja. 76
Uzbekistano, USSR

Esploroj pri libroj kiuj mencias esperanton

C. Nourmont kompilas liston de nacilingvaj libroj, en kiuj aperas mencio pri esperanto (ĉefe romanoj k.s.), bonvolu sendi detalojn: aŭtoro, titolo, eldonejo, eldondato, paĝo en la koncerna eldono. Se temas pri traduko, bonvolu mencii en kiu lingvo ĝi estis verkita. Se temas pri originalaĵo, preferere sendu fotokopion de la teksto.

Adreso, kie kun danko oni ricevos tiujn informojn: S-ino C. Nourmont, 2 Om kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgio.

Jubilea UK en Varsovio

La Estraro de UEA dum siaj januara kunsido en Roterdamo definitive decidis, ke la Jubilea, 72-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Varsovio. La provizora temo estas "Esperanto - cent jaroj da interkompreniĝo inter kulturoj".

Kiel oni informas la loko de la posta Kongreso, en 1988, ankoraŭ ne estas decidita.

Hur går det med frimärken?

Som bekant samlar vi här i Sverige använda frimärken som gåva till UEA. Nu efter bl a julfrimärken och rabattfrimärken samt alla nyttgävor är det nog lämpligt sända en första omgång till Jan Strömerne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö, f.v.b. UEA.

Alla frimärken alltså, även utländska.

Aĉetu SEF-glumarkoj!

Glumarkoj por la jarkongreso de SEF en Helsingborg vi povas aĉeti ĉe EsperantoCentro, pg 2012-3 aŭ ĉe ABF:s förmedlingservice pg 436 51 83-5.

1 karto = 32 pecoj kostas 5 kr

Birdo Fenikso

de August Strindberg

Li estis feliĉa! Sed li estis pli fier-
ra ĉar janulino volis havi lin.

– Nur postrikolto! diris liaj
amikoj.

Post unu jaro la edzino naskis
bebon. Por patro infankroj estis
nekutimaĵoj, kaj li volis dormi
dumnokte. Transloĝiĝis en sian
ĉambron, sed la edzino ploris. Li
opiniis ke virinoj estas trudi-
ĝemaj. Kaj ŝi estis ĵaluza pri la an-
taŭa edzino. Iakazo estis ke li iam,
kiam ili estis gefianĉoj, stulte diris
ke ŝi similas al lia unua edzino.

Kaj li lasis ŝin legi iliajn amlet-
rojn. Nun kiam ŝi pli ofte estis so-
la, ŝi rememoris ĉion. Ŝi do sciis,
ke ŝi heredis ĉiujn karesnomojn
de la antaŭa, kaj ke ŝi estas nur
anstataŭantiĉono. Tio incitis sin
kaj ŝi faris ĉion, ĉiujn ajn stulta-
ĵojn, por gajni lin nur por si mem.
Tio tedis lin. kaj kiam li dum siaj
solaj horoj faris komparon, la no-
va edzino malgajnis sufiĉe multe.
Ŝi ne estis tiel milda kiel la an-
taŭa, kaj ŝi incitis liajn nervojn.
Krome li surpris al la infanoj. kiujn

li pelis el la hejmo. Li ankaŭ havis
malagrablajn songojn, kaj sentis
sin malfidela al sia mortinta ed-
zino.

Ne plu estis agrable en la hej-
mo. Tio kion li jam faris estis mal-
saĝa, kaj ĝi povus esti nefarita.
Kaj li komencis viziti la urban re-
storacion. Sed tiam la edzino fu-
riozis. Li trompas ŝin. Li estas
maljuna cikonio, sed li gardu sin.

Tiel maljuni kamarado ne lasu
sian junan edzinon sola, ĉar tio
povas esti danĝera!

– Maljuna? Ĉu li estas tiel
maljuna? Li montru ŝin!

Kaj ili ree dormis kune. Sed tio
multobligis la ĉagrenon. Li ne vo-
lis helpi ŝin luli dumnokte, kaj la
knabineto kuŝu en la infanejo!
Ne, li vere ne faris tiel kun la in-
fanoj de la antaŭa edzino.

Li estis elturmentata. Dufoje li
kredis ke li vidis birdon Fenikso
elflugi el la cindro de la dekk-
varjarulino, unue per la filino,
poste per la dua edzino, sed en lia
memoro nun vivis nur la unua, la

etulino en la pastra bieno, je la
fragotempo, sub la tilio, en la ar-
baro, ŝi kiun li neniam akiris; sed
nun kiam alproksimiĝis lia sunsu-
biro kaj la tagoj mallongiĝis, nun
li en siaj nigraj horoj vidis nenion
krom la bildo de "panjo", kiu
estis tiel bonvola al li kaj liaj in-
fanoj, kiu neniam kverelis, kiu
estis malbela, ki estis en la kuire-
jo, kiu riparas la ledopantalonojn
de la knaboj kaj la juojn de la
knabinoj; kaj kiam lia venkebrilo
forpasis kaj liaj okuloj ree vidis
klare, li demandis sin, ĉu ne "pan-
jo" estis la vere birdo Fenikso,
kiu tiel bela kaj trankvila eliris la
cindron de la dekkvarjara or-
birdo, post kiam ŝi metis siajn
ovojn kaj donis sian brustlanugon
al la idoj kaj nutris ilin per si
sango, ĝis ŝi mortis.

Li multe cerbumis pri tio, kaj
kiam li fine kuŝiĝis sian lacan ka-
pon sur la kusenojn por neniam
plu leviĝi, li estis konvinkita.

Tradukis Bo Sandelin



15 april

Sista anmälningsdagen till SEF:s
årskongress i Helsingborg 16-19
maj. Hela programmet och hur du
anmäler dig finns i La Espero nr
2/85.

OPINIO

Honoro al Belgio

kiu siavice honoris la Esperan-
to-kongreson 1982 per la justa,
atentiga motivo sur la poŝtmar-
kojn, La Babela Turo!

Ludoviko Zamenhof

ĉu eble vi iam pensis kiel mi? Ke
Disinjoro verŝajne estis tro juna
je la tempo kiam homoj – de
proksime kaj malproksime, ĉiuj
babilis la saman lingvon – kon-
struis urbon kaj turon. Disinjoro
vidis la turon kaj ekkonis la celon:
ke ĝi atingos ĉielon!

De nun, li resumis, nenio estos

nefarebla de homoj – kion ajn ili
decidas fari...

Do, li malleviĝis al ili konfuzis
ilian lingvon – por ke unu ne
komprenu la parolon de alia!

Kaj "disigis ilin de tie" de ne-
finita projekto "sur la supraĵon de
la tuta tero".

Genezo/mos. 11.

Hodiaŭ nia Dio certe dirus al
ĉiuj:

Lernu Esperanto, la Internacia
Lingvo

por ke vi komprenu unu la alian!

– nenio estas neeble –

Karin Sehlstedt

Korespondpetoj

Allan PENTTINEN
Parraskuja 8 C 18
501 70 Mikkeli, Finlando
finna pastro, kiu deziras korespondi kun svedoj

S-ino Simone BOUTINES
212 rue Judaique
F-33000 Bordeaux

S-ino Gilberte LASSALLE
21 rue Blanqui
F-33150 Cenon

Annett SCHUSTER
Grundaer Str 15
G D R - 8010 Dresden
estas 17 jara kaj ŝatas fremdajn lingvojn, sporton kaj literaturon, deziras korespondi kun svedaj junuloj.

A.A. Ta'janmadi
AHWAZ
Koye Enghelab
Albovz St no 146
Post Cod 614 36 IRAN
27-jarulo

Karin MESSNER-DODU
1900 Timisoara
Str 1 Decembrie nr 1
România
28 jara, tradukistino ĉe esplorprejektinstituto por levinstalajoj. Intereso: kulturoj, lingvoj, artoj.

Petr STANEK
Rýmařovská 432
199 00 PRAHA 9 - Letnany
Cehoslavakio
24 jara, maŝina seruristo, intereso: sporto, geografio, historio deziras scii pri Svedio

SILKE KEILING
2700 Schwerin
Cottbuser Str. 2/1002
EVP 0,20 M
DDR
19-jara komencantino
JANUSZ RZADKOWSKI
ul. Przy Agorze 5A m 16
01-960 Varsovio, Pollando
18-jara studento, kiu studas pedagogiko

ANNA BASZEWSKA
ul. Polna 34/84
85-163 Bydgoszcz
Pollando
17-jara fraŭlino, kiu ŝatas danci, sporto...

ISTVÁN MÁDY
H-8600 Siófok
Kele 26
Hungario

CYRYLA MAZUREK
Cukrownia 14/10
PL-88126 Tuczno k./Inowrock
Pollando
58-jara virino, kiu interesiĝas pri literaturo kaj vojaĝoj.

WANDA GRABOWSKA
ul. W. Wasilewskiej 10/14
96-100 Skierniewice
Pollando
32-jara komencanto

MARIA PIERZCHAWKA
Konopnickiej 28/9
PL 88-100 Inowrockaw
Pollando
59-jara virino, kiu interesiĝas pri literaturo

Novaj poŝtmarkoj

La 14-an de marto la sveda poŝto aperigas serion de kvar novaj poŝtmarkoj. Ili prezentas du bestojn kaj du florojn.

Muskardino (hasselmus) estas eta aktiva noktbesto, 14 cm longa de nazaĵo ĝis vostpinto. Ĝi vivas prefere en kverkarbaroj kun subvegetaĵoj de avelulaj arboj, kie ĝi lerte grimpas en la arboj kaj arboj. Tage la muskardino dormas en lerte kunplektita nesto en la arboj.

Sian manĝon ĝi serĉas dumnokte. Ĝi manĝas berojn sukuplenajn kreskaĵpartojn, glanojn kaj nuksojn. Ĝi estas nia sola t n dormuso kaj pasigas la vintron dum letargio en speciala vintra nesto sur la grundo. En suda kaj meza Svedio ĝi estas minacata de niaj enmiksoj en ĝia natura vivmedio.

kiu fariĝas pli kaj pli malofta pro la influo de la homo.

Ŝavelo (storröding) devenas el la savelaj specoj, kiuj vivis dum lasta glaciperiodo. Post kiam la glacio degeliĝis la ŝavelo evoluigis en grandaj, klaraj akvoj en la malaltaj regionoj, kaj ĝi ankoraŭ pluvivas en kelkaj svedaj lagoj.

En la lago Vättern ĝi ankoraŭ havas rifuĝejon en profundaj, malvarmaj, klaraj akvotavoloj, kie ĝi povas atingi ĝis 9 kilogramojn.

En aliaj svedaj akvoj ĝi tamen komencas konsiderinde malpliigi. Tio parte dependas de pli akra konkuro de aliaj fiŝspecoj sed ankaŭ de novaj pli efikaj fiŝkaptmetodoj. Forte kontribuas ankaŭ la kreskintaj ellasado kaj acidiĝo en la lagoj.

La sentema ŝavelo estas ho-

diaŭ uzata kiel indikilo de diversaj ŝanĝoj en la medio.

Nigritelo (Brunkulla) estas unu el la plej maloftaj orkideoj en la Nordo. Ĝi kreskas nur en la altmontaro kaj en la Alpoj. La nigritelo estas provincloro de Jemtlando. Ĝi estas nigre-ruĝa, malalta kaj forte vanilodoranta. Ĝia medio estas liberaj herbejoj. Sed tiaj herbejoj estas nun tre maloftaj, kaj la nigritelo estas minacata de sufokiĝo.

Akvolilio (Nimphaea, röd näckros) estas speciala formo de la blanka akvolilio. Origine ĝi nur troviĝas en Tiveden, kaj ĝi estis objekto de forta prirabado. Tio okazigis ke ruĝaj akvolilioj en Tiveden estas minacataj de pereigo. Krome la restanta ekzisto estas atakita de bakterioj, kio plue malbonigas la situacion.

RUNE STRIDELL